FREŜA VENTO №4.

LATVIO BET ★ 57 Mardo, la 18-a de julio

La PROGRAMO de la 57-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj:

MERKREDO, 19.07.

8.00 – 9.00	Matenmanĝo	Studenta hotelo, 1-a etaĝo
9.00 ~ 17.00	Tuttaga ekskurso	Kolektiĝo ĉe BET-ejo

Dimanĉe, la 16-an de julio multajn BET-anojn kunvenigis la intereson vekiĝinta kaj alloga frazo en la programo de BET-57:

Granda kvizo pri Eŭropo.

“La kvizo pri Eŭropa Unio okazis kadre de TEJO projekto, kiu okazis dum EJO 2023 en Strasburgo, Francio.

Dum la kvizo partoprenis kvin teamoj kun pli da kvin membroj po teame kaj rilatis pri Eŭropa Parlamento, eŭropaj lingvoj kaj minoritataj lingvoj en Eŭropo ktp. La teamo, kiu venkis, estis „*simple ni*” kun 16 poentoj! La premio estis tipa dolĉaĵo de itala urbo Voghera, de kie devenas la kunordiganto de la kvizo Giovanni” — informis **Giovanni de Lucia** (Italio).

Giovanni de Lucia
gvidas la
„Grandan kvizon pri Eŭropo”

Kontentaj geBETanoj
dum la
„Granda kvizo pri Eŭropo”

Atendante UK-on en Torino

Dum unu horo la aŭskultantoj de la Somera Universitato ĝue travagadis Italion dank' al **Giovanni de Lucia.**

Lia prelego **"Kiom da landoj Italio enhavas?"** estis la lavango da informoj pri ĉiu parto de la kulture, historie kaj laŭ la gustoj riĉega lando. Nun ni certas, ke estas 20 regionoj vere diferencaj pro dialektoj, malsamaj pejzaĝoj, sed ankaŭ pro la maniero prepari la pastaĵojn.

La prelego estis bona enkonduko por esperantistoj kiuj baldaŭ kongresos en Torino kaj eble ankaŭ en Lignano Sabbiadoro. DANKON AL GIOVANNI!

Gražina Opulskienė (Litovio)

Giovanni de Lucia konatigas aŭskultantojn kun landoj de Italio.

Foto: **Margarita Želve** (Latvio)



Tuomo Grundström tre alloge gvidas aŭkcion.

Foto: **Margarita Želve** (Latvio)

Tõnu Hirsik kun nordana ĉarmo konatigas ĉeestantojn kun vizitindaj lokoj de Estonio.

Foto: **Margarita Želve** (Latvio)

ATENTON!

Morgaŭ, la 19an de julio, la matenmanĝo estos je la **8.00 – 9.00.**

Estimataj BETanoj! Reehu! Kunlaboru! Verku! Ni atendas viajn artikolojn, poezion ktp.

La numeron preparis: Organiza komitato de BET-57, kompilis Genovefa Tamane.